

## PRI MEDICINA TERMINOLOGIO EN ESPERANTUJO:

Recenzo de la Oklingva Medicina Enciklopedia Vortaro (OMEV)  
de Jozo Marević

On medical terminology in the world of Esperanto:

Recension of the Eight-language Medical Encyclopaedic Dictionary (ELMED)  
by Jozo Marević

KLAWE Christoph

*Department of Neurology and Neurophysiology, Hospital of the Brothers of Mercy, Nordallee 1-3, Trier, Germany*

**Abstract**

*This article summarizes briefly the needs of medical terminology and highlights the history of medical dictionaries in the international language Esperanto. The pros and cons of the recently published "Eight-language Medical Encyclopaedic Dictionary" (ELMED) by Jozo Marević are discussed. Peculiar about this book is the fact that it stresses the importance of Latin as mainstay of medical terminology, but contains Esperanto-translations of the medical terms as well. In spite of some considerable flaws the ELMED constitutes a value in itself as an example of the European cultural tradition in medicine. By means of international collaboration the editors will definitely make the second edition a great success.*

**Keywords:** Medical terminology, medical dictionaries, operationalized diagnostics, Esperanto, Latin.

**Corresponding author:** c.klawe@bk-trier.de

Speciale por la internacia kunlaboro de medicinaj fakuloj klara terminologio estas bezonata. Por akiri scian progreson gravas, ke ĉiuj esplorantaj sciencistoj uzas la samajn difinojn por la solvendaj problemoj. Nur tiel ili povas ĝuste kompari siajn esplorrezultojn. En la historio de medicino terminologia ĥaoso ofte baris la vojon al mutuala interkompreno. Bona kaj klara terminologio ekzemple por diagnozoj des pli gravas, kiam ili ne povas esti konfirmitaj laŭ unu aŭ pli teknikaj datenoj ricevitaj uzante aparatojn aŭ laboratoriajn metodojn. Tiu ĉi problemoj estas solvita en moderna medicino per t.n. "peroperacia diagnozo", kiu signifas, ke komisiono de fakuloj el la plej altestimataj fakaj asocioj koncerne specialajn terenojn de medicino interkonsentas liston de kriterioj, kiuj devas esti plenumitaj por fari la diagnozon; samtempe tiel ili difinas, kiuj malsanoj kun kiuj nomoj fakte ekzistas laŭ la aktuala stato de scienca ekono – kompreneble afero de konstanta evoluo.

Ekzemple La Monda Organizo pri Sano solvis la defion per la enkonduko de la "Internacia Klasifiko de Malsanoj" (ICD), kies aktuale valida eldono estas la 10-a (ICD-10) [1], la psikiatraj fakasocioj, por kiuj la problemoj de historie tre diversaj nomenklaturaj estis aparte tikla, per la

eldono de la "Diagnoza kaj Statistika Manlibro" (DSM), nun en la 5-a versio (DSM-V) [2]. Tiuj klasifikiloj estas tutmonde uzataj.


Bona ekzemplo por peroperacia diagnozo el la neŭrologa fako estas ekzemple la "Reviziitaj McDonald-Kriterioj el la jaro 2010" [3] por la diagnozo de Multobla Sklerozo aŭ la iam laŭ la renkontiĝejo de la konsiliiginta grupo nomitaj kriterioj por la diagnozo de Amiotrofa Flanka Sklerozo (ALS), unue la El Escorial – [4], poste la Airlie House – [5] kaj aktuale la Awaji-kriterioj [6].

Ekde la komenco de la Esperanto-movado fakuloj de diversaj sciencoj pripensis la taŭgecon de la internacia lingvo por faka agado. Inter ili tuj troviĝis kuracistoj, kiuj revis pri ebleco faciligi internaciajn kongresojn kaj elŝanĝojn de sciencaj novaĵoj.

La uzado de fakvortoj de latina kaj malnovgreka deveno jam havis longan tradicion en medicino, kaj multaj kuracistoj estis al kutimiĝintaj al tiuj tradiciaj fakaj terminoj. Sekve, kvankam sendube eblas simple esperantigi ĉiujn tradiciajn medicinajn fakvortojn, ĉar ilia signifo estas ja simple tradukebla el la latina aŭ greka, la pioniroj de faka Esperanto-agado en medicino ofte decidis kvazaŭ enkonduki la konatajn latingrekajn fakesprimojn en Esperanton.

Tiu decido estas komprenebla, ĉar ekzemple la termino “diabeto” estas por hodiaŭaj medicinistoj internacie tuj multe pli bone komprenebla ol la traduko de la originala greka vorto kiel “transfluo”.

La unua grava rezulto de medicina terminologia laboro en Esperantujo estis en la jaro 1932 la publikigo de la „Esperanta Teknika Medicina Vortaro“ (ETMV), verkita de d-ro Maurice Briquet (1865-1953) de Lille, Francio, kaj eldonita de Internacia Medicina Revuo [7].




Maurice Briquet, Esperanta Teknika Medicina Vortaro (ETMV) – 1-a paĝo

Tiu ĉi bindita eldono en poŝlibra formato kun 359 paĝoj estis produkto de plibonigo de antaŭa provversio laŭ instigoj, kiujn la aŭtoro ricevis de kolegoj el diversaj landoj. Troviĝas en la ETMV la proponitaj kapvortoj kun mallongaj eksplikoj en Esperanto. En la antaŭparolo Briquet skribas, ke „Ĉiuj lingvoj evoluas, kaj, iom post iom, per uzado, per interkonsento, per pridiskutado, ni akiros sufiĉe bonan teknikan lingvon.“ [8] La pioniran kaj modestan sintenon de la aŭtoro eĉ emfazas aparta paĝo kun „Konsiltoj al la korektontoj“ [9]. Sur limigita merkato nur aperis unu eldono de la ETMV.

Dua notinda paŝo estis la “Esperanta Medicina Vortaro” (EMT) de d-ro Josef Hradil (1924-2008), Ĉeĥio. Surbaze de ĝi, je la jaro 1979 la “redakcio de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)” eldonis post pridiskutoj kaj faka interkonsento prilaboritan version kiel “EMT de la UMEA” [10].

En la jaro 2001 la 720-paĝa „Angla-Esperanta Medicina Terminaro“ (AEMT) verkita de profesoro Yamazoe Saburoo (1908-2007), Japanio, estis eldonita de la UMEA-Shinoda-Kuracejo en Krakovo, Pollando [11].

Laŭ ekspliko en la antaŭparolo la aŭtoro „precipe celas helpi al tiuj kuracistoj aŭ medicinistoj, kiuj studis medicinon pere de la angla lingvo kaj nun deziras verki medicinan artikolon en Esperanto“ [12]. Yamazoe baziĝis la esperantan tradukon de la anglaj kapvortoj sur la nun klasika ETMV de Briquet kaj PIV, unuafoje publikigita en la jaro 1970 [13]. Li indikas ĉiam, el kiu de tiuj du fontoj la uzita esprimo venas. Yamazoe tamen rekomendas „...al la uzantoj de AEMT preferi la terminon en PIV, ĉar la termino en la vortaro de Briquet povas esti malnova.“ Kiam li



Yamazoe Saburoo, Angla-Esperanta Medicina Terminaro (AEMT) – kovrilpaĝo, ISBN 83-908748-1-4

ne trovis la terminon en ambaŭ vortaroj kaj aliaj, li „...mem faris novan vorton ĉefe el la angla termino laŭ la ortografio de Esperanto.“ Yamazoe kunlaboris kun internacia skipo por pretigi sian terminaron, partoj de la verko estis antaŭe publikigitaj kiel aldonaĵoj al „Medicina Internacia Revuo“ (MIR), organo de la „Universala Medicina Esperanto-Asocio“ (UMEA) por instigi diskuton kaj plibonigon. La kunlaborantaro de Yamazoe konsistis ĉefe el aktivaj UMEA-anoj.

En la jaro 2006 sekvis de la sama aŭtoro kaj eldonejo la „Esperanta-Angla Medicina Terminaro“ (EAMT) [15] kun 533 paĝoj, kiu bone kombinis kun la AEMT al AEMT-EAMT en du volumoj. Ĉefa novaĵo kompare al la AEMT estis la enkonduko de la medicinaj terminoj el la PIV-eldono el la jaro 2002 (NPIV) [16].

Ankaŭ de la AEMT-EAMT ĝis nun unu eldono estis presita. Por praktika uzado la AEMT-EAMT estas tiom taŭga, ke ĝi ĝis nun estas uzata kiel referencverko de la UMEA kaj ties organo MIR.

Nun aperis je la jaro 2016 kun eldondato de la jaro 2015 en la eldonejo Marka je Velika Gorica,

Kroatio, nova rimarkinda kaj pridiskutinda, interesa medicina vortaro, nome la “Oklingva Medicina Enciklopedia Vortaro” (OMEV) de profesoro d-ro sci. Jozo Marević, kroata fakulo pri la latina kaj germana lingvoj [17].

La bele bindita verkego en nur unu volumo, presita sur tre maldika papero, havas 3148 paĝojn.

La granda amplekso de la verko estas kaŭzita de la fakto, ke temas pri medicina enciklopedio en la lingvoj latina, angla, franca, germana, hispana, itala, Esperanta kaj kroata. Ne klaras, kial en internacia verko ne estas elektitaj la ISO-639 mallongigoj por la specifaj lingvoj, sed aliaj (eng., fr., d., es., tal. kaj iloj).

El la uzitaj lingvoj la recenzanto mem, medicina fakulo pri neŭrologio kaj psikiatrio, krom Esperanto regas nur la germanan, la anglan, la latinan kaj ne sufiĉe bone la francan, do la sekvonta recenzo nur koncernas la ĝeneralan formon de la verko kaj la Esperantan, latinan, germanan kaj anglan enhavon. Recenzoj de la aliaj partoj de la libro espereble estos verkitaj de aliaj fakuloj.

Kvankam oni trovas la vorton “Esperanto” sur la kovrilo de la OMEV, la aŭtoro laŭ ekspliko en la Eo-versio de la antaŭparolo elektis la mallongigon “ilo” por Esperanto ene de la libro kiel omaĝo al Helmar Frank kaj Ivo Lapenna [18].


Estas publikigitaj antaŭparoloj en ĉiuj ok lingvoj, kiuj tamen laŭ la enhavo pli aŭ malpli subtile malsimilas.

Kiel referenclingvo kaj ĉiufoje lingvon de la unua kapvorto la aŭtoro elektis la latinan, ĉar, laŭ ekspliko en la sama versio de la antaŭparolo, “ĝi estis tra multaj centjaroj la medicina lingvo” [19].

Laŭ rimarko en la germana versio de la antaŭparolo [20] kialo por la unuarangaj pozicioj de la latinaj kapvortoj eĉ estas helpi “...revenon kaj reenkondukon de la latina lingvo en la medicinon de la mondo.”

Tiu estas iel altestiminda sinteno el la vidpunkto de eŭropa tradicio kaj klasika edukado, sed tamen ankaŭ iel romantika, ĉar nerufeteble hodiaŭ la plej grava lingvo en la sciencoj, kaj tiel samtempe ankaŭ en medicino, estas la angla. La tendenco fakte en multaj landoj estas, ke medicinistoj, kiuj estas al kutimiĝintaj al legi gravajn publikaĵojn en la angla, komencas uzi la anglajn esprimojn kiel fremdvortoj en sia nacia faklingvo (kiel ekzemple “Stroke Unit” por “Departemento pri Apopleksio”). Tiun tendencan la publikigo de la OMEV certe ne ŝanĝos.

Bona ideo, inkluzivi en la libron deklaron pri etikaj valoroj, la ĵuron de Hipokrato, de la



Jozo Marević, Oklingva Medicina Enciklopedia Vortaro (OMEV) – kovrilpaĝo  
ISBN 978-953-98153-9-2

medicinaj asocioj en la landoj, kies lingvoj estas uzitaj. Alia altestiminda omaĝo al klasika medicino edukado.

Tralegante la germanan version de la antaŭparolo oni tuj rimarkas, ke ĝi ne estis verkita de denaskulo. Mirinda fakto, ĉar per internacia kunlaboro certe estus facila trovi proleganton, kiu regas la germanan ne kiel fremdan, sed sian propran lingvon. Ekestas problemoj el tiu manko ankaŭ koncerne la germanajn kapvortojn. Ekzemple "Harnruhr" kiel ekvalento de "diabeto" entute ne plu estas komprenebla por nuntempa germana kuracisto, kvankam la esprimo certe troviĝas en iu historia lernolibro de interna medicino. Povas esti senchava inkluzivi tiun malnovan esprimon en la liston de la tradukoj, se la celo estas helpi ankaŭ la komprenon de historiaj medicinaj libroj; tamen tiu ebleco verŝajne ne ofte estos bezonata de la leganto, sed kontribuas al ega dikeco de la OMEV.

La bibliografio citas la plej ofte uzitan germanan medicinvortaron, "Pschyrembel", kiu longtempe estis noveldonita ĉiun kvaran jaron, en la versio de 1998. Pli aktualaj eldonoj aperis je la jaroj 2002, 2004, 2007, 2011, 2012, 2013 kaj 2015 [21].

Fakte en la listo de la konsilantoj pri "lingvaj kaj medicinaj artoj" (5-a paĝo de la libro, sen paĝonumero) troviĝas 40 kroataj fakuloj vivantaj kaj laborantaj en kaj ekster Kroatio, nur la menciita specialisto pri la angla estas japano, la specialistoj pri Esperanto brazilano kaj ĉino.

Bedaŭrinde, ke oklingva enciklopedio ne havis almenaŭ same multnacion konsilantaron. Ankaŭ strange estas, ke inter la kunlaborantoj entute ne troviĝis membroj de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kiu ne estis kontaktita de la aŭtoro. Estas ja konata, ke gravaj klopodoj por la plibonigo de esperanta terminologio en medicino eliris de tiu faka asocio, kiel la supre menciitaj ETMV, EMT de UMEA kaj AEMT-EAMT montras.

Rigardo en la liston de la por la preparo de la OMEV uzita literaturo montras ankaŭ, ke neniu el tiuj medicinaj Esperanto-vortaroj el la ĉirkaŭaĵo de la UMEA estis atentitaj. Ili ne aperas en la bibliografia katalogo [22].

Konsekvenco estas, ke do la kunlaborantoj por la Esperanta parto de la OMEV ŝajne denove elpensis esperantigojn de la konataj fakesprimoj. Kelkfoje ili trafis la esprimojn jam proponitajn de la supre priskribitaj aliaj terminaroj, kelkfoje ne.

Kvankam la diferencoj nur estas malgrandaj kaj ofte nur koncernas la elekton de taŭgaj finaĵoj, laŭ la opinio de la recenzanto neniam utilas ĉiam denove fari la laboron (ekzemploj: AEMT epidurala, OMEV epidura; AEMT skizonikeco, OMEV skizonikio k.t.p.). Kompreneble oni certe povas pridiskuti la plej bonan solvon el filologia vidpunkto, sed tiel oni povas okupi ankoraŭ multajn generaciojn. Se ne ekzistas grava kialo ŝanĝi la jam en la AEMT-EAMT aŭ PIV enkondukitan fakan esprimon en Esperanto, mia opinio indas konsekvence uzi ĝin por celi regulecon kaj klarecon. Ne nepras krei novajn proponojn por malnovaj fakesprimoj en novaj fakvortaroj sen respekto de la jam ekzistantaj. Pli problemo estas tiurilate, ke la bibliografia listo de la OMEV citas la PIV-eldonon de la jaro 1984 (p. XXX) [23] – intertempa apero de pli aktualaj PIV-versioj estis jam kialo por Yamazoe ĝisdatigi sian AEMT per aldono de EAMT.

Kiel la aŭtoro de la OMEV en la antaŭparolo same klare konstatas kiel ĉiuj siaj antaŭuloj, tute alia situacio estas, kiam novaj malsanoj, metodoj aŭ aparatoj aperas en medicino – ili bezonas novajn terminojn, kiuj estas pridiskutindaj inter fakuloj antaŭ fina agnosko por faka uzado.

Koncerne la latinan parton de la OMEV ekzemple la plej aktuala oficiala nomenklatureto de la anatomio, "Terminologio Anatomica", estas perfekte atentita.

Kaj ICD-10 kaj DSM-V mankas en la bibliografio. Tial aparte menciinda estas la psikiatra parto de la vortaro. Kvankam multaj terminoj el la malnova psikopatologio, kiuj kontribuis al konfuzo en psikiatrio, estas enigataj en la vortaron, oni vane serĉas la plejmulton de la diagnozaj kategorioj el DSM-V, nuntempe devige uzitaj de internacie kunlaborantaj psikiatroj. Tamen kompreneble eblas trovi unuopajn vortojn, kun kiuj oni ofte sukcesas mem kombini la deziritajn terminojn. Same kiel diskutita supre koncerne la uzon de antikvaj esprimoj el interna medicino, avantaĝo de tiu strategio povas esti, ke OMEV povas helpi la komprenon de malnovaj lernolibroj pri psikopatologio.

Kaŭze de ĉiuj tiuj kritikpunktoj la taŭgeco de la OMEV por la aktiva kuracisto estas iom limigita.

Same la aplikeblo de la OMEV kiel helpilo por pacientoj kaj ne-fakuloj, kiel intecita almenaŭ laŭ la angla versio de la antaŭparolo, ekster Kroatio estas iomete limigita ĉar la mallongaj eksplikoj,

kiuj ofte akompanas la kapvortojn, nur troviĝas en la kroata.

Entute, por pacientoj kaj ne-fakuloj sen konoj de la latina la latinaj kapvortoj ĉiam sur la unuaj rangoj de la vortlistoj ne invitas al serĉado, kaj indeksoj ekzistas nur por tri el la reprezentitaj lingvoj, nome la kroata, la angla kaj la germana.

Mankas la enplekto de fakterminoj el kutime uzitaj modernaj internaciaj diagnozaj terminaroj (ICD-10, DSM-V kaj aliaj).

Esperantista medicinisto devas pledi por atendo de la jam en Esperanto ekzistantaj gravaj medicinaj terminaroj.

Generale, internacia skipo por prepari la duan eldonon estas rekomendinda por perfektigi la lingvan kvaliton kaj ĝisdatigi la enhavon.

Indeksoj por ĉiuj uzitaj lingvoj necesas.

Resumante, la OMEV estas admirinda atesto de la laborforto kaj idealismo de la aŭtoro kaj ties kunlaborantoj. Kun ĝia atestimo de la latina kiel tradicia kulturlingvo kaj de medicino kaj de Eŭropo kaj la celita internacieco per oklingva formato, la OMEV estas vera monumento de Eŭropa klereco.

Malgraŭ la supre indikitaj malfortaĵoj, kiuj ankoraŭ bezonas plibonigon, OMEV estas modela specimeno de la esenco de Eŭropa kulturo kaj bone montras, ke Esperanto rajtas havi lokon en la fakvortaroj de medicinistoj. La verko kostas 190 € kaj indas nian apogon.

## Resumo

Tiu ĉi artikolo mallonge resumas la bezonojn de medicina terminologio kaj prilumas la historion de medicinaj terminaroj verkitaj en la internacia lingvo Esperanto. Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la antaŭnelonge eldonita Oklingva Medicina Enciklopedia Vortaro (OMEV) de Jozo Marević estas diskutitaj. Rimarkindas la fakto, ke ĝi akcentas la gravecon de la latina lingvo kiel bazon de medicina terminologio, sed ankaŭ enhavas la Esperanto-tradukojn de medicinaj terminoj. Malgraŭ kelkaj konsiderindaj malfortaĵoj la OMEV estas memstara valorajo kiel ekzemplo de la Eŭropa kultura tradicio de medicino. Pere de internacia kunlaboro la dua eldono certe estos granda sukceso.

## Referencaĵoj

1. <http://apps.who.int/classifications/icd10/browse/2016/en#!/X>
2. The Diagnostic and Statistical Manual of Mental Disorders (5th ed.; DSM-5; American Psychiatric Association, 2013)
3. Polman, C. H., Reingold, S. C., Banwell, B.,

- Clanet, M., Cohen, J. A., Filippi, M., ... & Lublin, F. D. (2011). Diagnostic criteria for multiple sclerosis: 2010 revisions to the McDonald criteria. *Annals of Neurology*, 69(2), 292-302.
4. Brooks, B. R. (1994). El Escorial World Federation of Neurology criteria for the diagnosis of amyotrophic lateral sclerosis. *Journal of the Neurological Sciences*, 124, 96-107.
5. Airlie House "Therapeutic Trials in ALS" Workshop Contributors (1995). World Federation of Neurology Research Group on Neuromuscular Diseases Subcommittee on Motor Neuron Disease. Airlie House guidelines. Therapeutic trials in amyotrophic lateral sclerosis. *Journal of the Neurological Sciences*, 129, Suppl. 1-10.
6. Costa, J., Swash, M., & de Carvalho, M. (2012). Awaji criteria for the diagnosis of amyotrophic lateral sclerosis: a systematic review. *Archives of neurology*, 69(11), 1410-1416.
7. Briquet, M. (1932). *Esperanta Teknika Medicina Vortaro; Internacia Medicina Revuo*, Brussels, Belgium.
8. ibidem, p. 1
9. ibidem, p. 2
10. [https://eo.wikisource.org/wiki/Esperanta\\_Medicina\\_Terminaro\\_\(Hradil\\_1979\)](https://eo.wikisource.org/wiki/Esperanta_Medicina_Terminaro_(Hradil_1979))
11. Yamazoe, S. (2001). *Angla-Esperanta Medicina Terminaro; UMEA-Shinoda-Kuracejo*, Krakow, Poland.
12. ibidem, 3rd page.
13. Waringhien, G. (1970). *Plena Ilustrita Vortaro; SAT*.
14. Yamazoe, S. (2001). *Angla-Esperanta Medicina Terminaro; UMEA-Shinoda-Kuracejo*, Krakow, Poland. 3rd page.
15. Yamazoe, S. (2006). *Esperanta-Angla Medicina Terminaro; UMEA-Shinoda-Kuracejo*, Krakow, Poland.
16. Duc-Goninaz, M. (2002). *Nova Plena Ilustrita Vortaro; SAT*.
17. Marević, J. (2015). *Osmojezični Medicinski Enciklopedijski Rječnik; Marka, Velika Gorica, Croatia*.
18. ibidem, p. XIII.
19. ibidem, p. XIII.
20. ibidem, p. X.
21. [https://en.wikipedia.org/wiki/Psychyrembel\\_Klinisches\\_W%C3%B6rterbuch](https://en.wikipedia.org/wiki/Psychyrembel_Klinisches_W%C3%B6rterbuch)
22. Marević, J. (2015). *Osmojezični Medicinski Enciklopedijski Rječnik; Marka, Velika Gorica, Croatia*. Pp. XXVIII-XXX.
23. ibidem, p. XXX.
24. *Terminologia Anatomica*, Thieme 2011.